ganizaĵoj. Tiel okazis en la unua laborperiodo, kiam la antireligia organizaĵo bezonis pli firme surgrundiĝi. Nun ĉi tiun laboron ni plenumis; ni opinias, ke ĉi tiaj disputoj kiel formo de antireligia propagando perdis sian antaŭan signifon. Tial ni tre malofte nun aranĝas tiajn disputojn, sed ankaŭ ĝis nun multaj niaj kamaradoj partoprenas publikajn disputojn kun pastroj.

Vi povas, ekz., ricevi, verŝajne, dekojn da afiŝoj, kie estas presita, ke parolas mitropolito Vvedenskij kaj aliaj pastroj en disputoj kun niaj kamaradoj. Certe, kiam ili elpaŝas, ili ricevas parolon por referato aŭ kunreferato, ili havas eblon partopreni diskutojn, diskutojn partoprenas ankaŭ kredantoj kaj a. Sed mi ripetas: tiaj disputoj ĉe ni fariĝis sufiĉe pli malmultaj ol dum la komencaj jaroj. Ni pri tio konsideras nur, k i o m  t i o  e s t a s  u t i l a  p o r  c e l o j  d e  a n t i r e l i g i a  p r o p a g a n d o. Antaŭan tempon, kiam kredantoj estis ankoraŭ tre multaj, disputojn vizitis iufoje pli multe kredantoj ol malkredantoj, sed nun, kiam popoj venas por antireligia kunveno kaj ĉirkaŭe estas preskaŭ nur malkredantoj, ili trafas en tre maloportunajn por ili kondiĉojn kaj ili preferas ne viziti tiajn kunvenojn.

DEMANDO. Ĉu estas permesate al pastraj infanoj lerni en supera lernejo?

RESPONDO. En nia komenclernejo ekzistas neniu interdivido, ĉe ni eĉ infanoj de l'«senrajtigitoj» t. e. senigitaj je elektorajto, lernas en komenclernejo. Eĉ tie, kie estas tre multaj senrajtigitoj, ekz., en rajonoj, kie loĝas malkulakigitaj senrajtigitoj, ni konstruas novajn lernejojn, en kiuj infanoj de senrajtigitoj povas lerni same kiel ĉiuj infanoj lernas. Sed en la s u p e r l e r n e j o, t. e. tie, kie ni preparas niajn g v i d a n t a j n  k o n t i n g e n t o j n, ni penas efektivigi certan klasan principon. A n t a ŭ  ĉ i o tien estas akceptataj laboristaj infanoj, infanoj de niaj fakuloj-specialistoj, laborantaj en niaj industriaj entreprenoj, en kolĥozoj k.a. institucioj. Kiel vi scias, ni havas ordonon de l'registaro, laŭ kiu infanoj de la teknikistoj, agronomoj, inĝenieroj, kuracistoj ktp. estas samrajtigataj kun laboristaj infanoj. Paralele kun ili marŝas infanoj de kolĥozanoj, kaj tie, kie estas liberaj lokoj estas akceptataj tiel nomataj la «ceteraj», t.e. povas lerni infanoj de pastroj ankaŭ. Sed ni opinias, ke n i a j n  f u n d a m e n t a j n  k o n t i n g e n t o j n  n i  d e v a s  p r e p a r i,  c e r t e,  n e  e l  p a s t r a j  i n f a n o j. Ja ni havas nun jenan staton: pastroj tre ofte abdikas sian pastran agadon kaj instigas demandon pri tio, ke se ni rifuzis pastran agadon, do liveru al ni ĉ i u j n rajtojn, kiujn ĝuas ajna laboristo. Ni opinias, ke por tio estas necesa c e r t a  p e r i o d o, por ke p a s t r o  p r u v u, ke li povas h o n e s t e  p e r l a b o r i panon por si, sed ne per tiu «laboro», per kiu ili akiris ĝin ĝis nun, t.e. per trompo de laboruloj. Por pastro ekzistas la vojo, se li rifuzas ĉi tiun «metion», fariĝi honesta laboranto kaj enviciĝi inter ĉiuj laboruloj, tiom pli ekzistas tia vojo por liaj infanoj. Ĉe ni ofte infanoj rompas ligon kun sia familio — kun kulaka familio, kun la komercista, kun la pastra — kaj okupas memstaran vojon, fariĝas junkomunistoj, aliĝas al la kompartio, eklaboras en fabrikoj, uzinoj kaj tute rompas ligon kun tiu socia medio, kiu edukis tutan homarspecon de parazitoj, tutan homarspecon de venenigistoj de popolkonscio, kaj enviciĝas inter konstruantoj de l'socialisma socio.

DEMANDO. Kia estas potenco de l'ateista movado, ĉu estas habveblaj statistikaĵoj k. c.?



RESPONDO. Ĉi demando estas respondita en la disdonita al vi broŝuro. UMA nun (novembro 1931 j.) enkalkulas pli ol 5 milionojn da membroj, kunigitaj en pli ol 60 mil ĉeloj. Ĉi tiun nombron UMA atingis dum treege mallonga periodo: en la unua jaro de sia ekzisto (1926) nia UMA havis nur 87.000 membrojn, en 1929 j. — 465.000 kaj jam en 1930 ĝi kreskis ĝis 3,5 milionoj da membroj.

Kresko de nia antireligia propagando estas videbla, ekz., en la eldonagado. Ni eldonis en 1927 j. tutkvante 700.000 presfoliekzemplerojn da libroj kaj broŝuroj, kaj en 1930 pli ol 50 milionojn da presfoliekzempleroj. Eldonkvanto de l'gazeto «Bezboĵnik» (Sendiulo) en 1927 j. estis 62.514 ekzempleroj da ĉiu numero meznombre, kaj nun ĝi atingas duonmilionon da ekzempleroj. Sammaniere, eldonkvanto de la revuo «Bezboĵnik» kreskis de 19.387 ekzempleroj ĝis 200.000.

DEMANDO. Ĉu estas vero, ke kamparanoj nur pro tio aliĝas al UMA, ke tio ilin liberigas de malkulakigo?

RESPONDO. Tiu, kiu faras tian demandon, ne konas nian kamparanon kaj ne scias niajn decidojn pri la agrokolektivigado. Kamparano kulako estas tute ne tia stultulo, kiu povas opinii, ke oni lin liberigos de malkulakigo, se li aliĝas al UMA. Unue, UMA  n e  a l i g a s  a l  s i  l a  k u l a k o j n: tial pri tio kulako neniel povas «opinii», sed se okazus tiu ridindulo, ja tio nenion rezultigus: neniun subtenon de UMA li ricevus. Al vi povas rakonti la ateista komuno Verĥne-Toluĉeevo, pri kiu mi supre parolis, ke unu el organizintoj de ateista movado tie estis la persono, kiun poste oni malkulakigis tuj post kiam tie estis organizita la komuno, do lia provo kaŝi sin en UMA neniomgrade helpis lin.

DEMANDO. Kion faras UMA por likvidi infanan senzorgitecon? Ĉu ĝi aranĝas paralele al ŝtataj domoj kaj komunoj ankaŭ komunojn, en kiuj membroj kaj gvidantoj de UMA partoprenas ankaŭ laboron pri edukado de utilaj por socio membroj el ĉi tiuj infanoj kaj adoleskuloj?

RESPONDO. Ĉi tiu demando devenas el tio, ke r e l i g i a j organizaĵoj de Okcidento okupas sin pri bonfarado kaj kelkiuj pri batalo kontraŭ la senzorgiteco. Tio en la kapitalistaj landoj havas karakteron de bonfarado precipe. Kelkiuj okcident-eŭropaj kamaradoj opinias, ke ankaŭ nia antireligia organizaĵo devas okupi sin pri io simila al la bonfarado. Ne, tio ne estas por ni elirpunkto. L a  t a s k o  b a t a l i  k o n t r a ŭ  l a  s e n z o r g i t e c o  e s t a s  d e v o  d e  l a  p r o l e t a  ŝ t a t o. Certe ankaŭ en Sovetio estas libervolaj asocioj, ekz., asocio «I n f a n a m i k o j», la speciala asocio, kiu helpas al la ŝtato kaj la ŝtato helpas al ĝi. Ni partoprenas ĉi tiun laboron ne kiel Unio de Militantaj Ateistoj, tio ne estas bezonata, ke ni substreku ajnan specialan karakteron de ĉi tiu laboro. Do speciale elimini  a p a r t a n  t a s k o n de l'likvido de senzorgiteco ni ne bezonas. Ni tielmaniere ĝin ne metas antaŭ ni.

Samtempe por ni tute ne estas sendiference, kiaj infanoj estos kreskintaj en infanvartejoj, komunloĝejoj, laborejoj, havataj en Sovetio Mi ne scias, ĉu ĉiuj kamaradoj vizitis laborkomunumojn de ekssenzorgituloj. Ni ĉie en ili faras antireligian laboron. Mi opinias, ke inter senzorgituloj de kapitalistaj landoj la laboro devas esti aranĝita pli vastskale ol ĉe ni, ĉar la senzorgiteco estas rezulto de la klasinterrilatoj, de l'klasregado, rezulto de tiu stato,

kiun trafis la laborista klaso. Al tiu predikado, kiun faras popoj, al dolĉeca predikado de bonfarado, de bigota «karito» estas necese kontraŭmeti a l i a n «p r e d i k a d o n» — nome, ke n u r t i a m, kiam elradike estos likviditaj sociaj kontradikcioj, naskantaj senzorgitecon, nur tiam povas esti dece arangita ankaŭ batalo kontraŭ la restaĵoj de l'senzorgiteco. Ĉe ni la senzorgiteco estas rezulto de tio, ke ni ne likvidis ankoraŭ restaĵojn de kapitalismaj elementoj, ke ankoraŭ elmontras sian influon rezultoj de l'civila milito de unuaj jaroj de l'revolucio. Sed la senzorgiteco ĉe ni ĉiam pli kaj pli malaperas, dume en ĉiuj landoj ĝi ne nur vastiĝas, sed vastiĝas ĉiam pli rapide.

DEMANDO. Pri la monrimedoj. Ĉu ricevas UMA regule ŝtatan subvencion? Estas ankaŭ demando, koncernanta kotizojn. Fine estas skribaĵo, per kiu oni petas sciigi membronombron de UMA, ĉu ekzistas kotizoj kaj kiom altaj kaj se tiuj ne ekzistas, do per kiu mono estas subvenciata UMA-laboro?

RESPONDO. Ĉefa mono, kiun ni havas estas niaj mebrokotizaĵoj, poste profito de literatura eldonado — de gazetoj, de ĵurnaloj, de broŝuroj ktp. Gustajn ciferojn mi ne povas nun sciigi al vi, vi povas ilin ricevi en CK UMA. Jen la kamarado informas, ke nia eldonejo ĉiumonate dekalkulas 30.000 rublojn por nia laboro. Ja ni havas tian sistemon, ke parto de la profito de eldonado estas transpagata al la ŝtato por la industriigo, por ŝtataj bezonoj, kaj 30.000 rubloj estas eligataj ĉiumonate por la antireligia laboro. La membrokotizaĵo urba de ĉiu membro, akceptita de ni, estas 0,60 rub. p o r j a r o kaj 0,24 rub. en vilaĝo. Kompare al germana marko, do proksimume unu marko kaj duonmarko por jaro. Lernantoj kaj ruĝarmeanoj ĉe ni estas liberigitaj je kotizaĵoj. Kiujn materifontojn ankoraŭ ni havas por ekzisti? Ni kontraktas kun sindikatoj pri gvido de antireligia laboro en sindikata kulturlaboro kaj de ili ricevas iomajn monrimedojn por aranĝo de ĉi tiu laboro. Specialajn monrimedojn de la ŝtato por tio ni ne ricevas.

DEMANDO. Ĉu estas vero, ke distriktaj gvidantoj de UMA perlaboras 500 rublojn por monato?

RESPONDO. Tioman salajron ni ne havas. Niaj distriktaj gvidantoj plej ofte estas k o m p a r t i a n o j, sed por la partianoj la plej alta salajro, ĝis nun ricevebla al ili, estas 300 rubloj por monato en Moskvo kaj en aliaj rajonoj de USSR ankoraŭ pli malalta. Samtempe distrikta gvidanto ĉe ni povas perlabori iom pli multe, ĉar li povas ankoraŭ aldone perlabori per literatura laboro, li povas iufoje ricevi honorarion por pagataj lekcioj, do ne estas maleble, ke apartaj distriktaj gvidantoj povas perlabori ĝis 500 rubloj kaj eĉ iom pli. Sed nun vi povas trovi en nia lando ankaŭ kvalifikitajn laboristojn, kiuj perlaboras proksimume samaltan sumon kaj eĉ pli grandan. Vi povas trovi tre multajn kvalifikitajn laboristojn-ilfaristojn, formokontrolistojn kaj eĉ, karbhakistojn en ŝaktoj, kiuj perlaboras 500 kaj eĉ pli rublojn, do tiu sumo ne estas tiom alta kvazaŭ ĝi karakterizas salajron de iu granda altpostenulo.

DEMANDO. Ĉu UMA aranĝas regule proletajn festojn, en kiuj estas montrataj celoj kaj taskoj de socialisma konstruado?

RESPONDO. Ni ne aranĝas specialajn antireligiajn festojn, sed partoprenas en ĉiuj revoluciaj festoj. Ĉe ni, ekz., en vilaĝoj estas aranĝataj festo de rikolto. Ni partoprenas ĉi tiun festadon, elpaŝas kaj montras ĉiufoje, kiu diferenco estas inter ĉi tiu festo kaj tiuj festoj, kiuj ekzistis antaŭe. Ni partoprenas en la unuamajaj festoj kaj en Oktobraj festenoj kaj ĉie tion mencias. En



ĉiun nian revolucian feston ni enigas antireligian strion, ni elpaŝas en ĉiuspecaj vespersolenoj, kiuj estas aranĝataj de laboristoj kaj kamparanoj, kun niaj spektakloj, teatraĵoj, kino, lekcioj, referatoj, antireligiaj kantoj. Ni havas multajn antireligiajn kantojn, tiel nomatajn «Ĉastuŝki», kaj morgaŭ en la demonstracio vi povos aŭskulti tre multajn similajn kantojn, kiujn tre malŝatas popoj.

DEMANDO. Ĉu ekzistas eldonita de ateistoj lernolibro pri proleta disciplino kaj moralo — lernolibro pri fundamentaj problemoj de mondkoncepto?

RESPONDO. Ne. Tian lernolibron ni ne intencas eldoni. Al la burĝaj fabeloj pri tio, ke ni ne havas moralon, la efektivo faris jam detruan respondon. Kio estas la burĝa moralo kaj moralo de l'nova socio? Por tio ni havas sufiĉe seriozan enfaktigitan respondon. Kompili specialan leĝaron de nia moralo, kolekton de ordonoj, reguloj ne necesas. Mi estas la sekretario de l'Centra Kontrola Komisiono de nia partio, kiu interalie zorgas pri tio, ke membroj de nia partio, komunistoj ne faru iujn maldecaĵojn, malhonorigantajn komunistojn. Okazas, ke ni devas nemalofte puni partianojn pro tiuj aŭ aliaj maldecaĵoj. Sed ni ĉe tio konsideras ne regulojn de absoluta moralo, sed interesojn de la klasbatalo. Se tiu aŭ alia faro de kamarado (ĉu ĝi koncernas lian rilaton al edzino, al la virino, al la infanoj, al la kamaradoj, ĉu ĝi koncernas konduton rilate al liaj devoj, kiujn li plenumas) havas karakteron, ke ĝi malutilas la proletan revolucion, ke ĝi malhelpas de nia afero laborulojn, do tio estas malutila, kaj ni devas tian faron malaprobi kaj ni ne malofte eksigas el nia partio tiajn homojn. En nia partio ne devas esti antisemidoj, ne devas esti entute homoj, kiuj ignoras interesojn de l'proletaro; ne devas esti en nia partio homo, kiu batas sian edzinon aŭ malkamaradece sintenas al virino; ne devas esti en nia partio homo, kiu sinjore rilatas al la infanoj. Tiuflanke ni zorgas pri tio, ke membroj de nia partio ne rompu interesojn de l'klasbatalo de proletaro. Sed ni konsideras ĉiam interesojn de la klasbatalo de l'proletaro, sed ne el abstrakta moralo, kaj estus malĝuste por ke estu kreata tia lernolibro, tia leĝaro de l'moralo, pri kiu vi demandas.

Sed tio tute ne signifas, ke ni entute havas neniujn normojn kaj ke ni havas nenion por gvidi nin. Sed se ni povus krei tian leĝaron, mi opinias, ĝi estus malviva. Ĉar ĉiu simila regulo estas ellaborata konforme al tia cirkonstanco, en kiu ni devas labori. Unuj estas cirkonstancoj por laboro kaj batalo ie ajn en Mez-Azio, Turkmenio, Uzbekio kaj aliaj cirkonstancoj ĉi tie en la industria provinco, en Moskvo. Kaj ni devus tiuokaze verki tian moralleĝaron, ke tio en Moskvo estas permesebla, sed en Turkmenio ne estas permesebla. Absolutajn verojn de l'moralo, utiligeblajn por ĉiuj epokoj en ĉiuj socio, ni ne scias.

Ni konas nur solon: ĉ i e n i a m o r a l o, t u t a n i a k o n d u t o d e v a s e s t i s u b o r d i g i t a a l l a i n t e r e s o j d e l' k l a s b a t a l o p o r l a p r o l e t a r e v o l u c i o, p o r l a s o c i a l i s m o, k a j e n ĉ i u a p a r t a o k a z o d e m a n d o d e v a s e s t i s o l v a t a ĝ u s t e t i e l — ĉ u d e c a s t i o, k i o n m i f a r a s, d e l' v i d p u n k t o d e t i u k o m u n a a f e r o, kiun mi defendas, de l'vidpunkto de tiu socio, al kiu mi apartenas, de l'vidpunkto de l'proleta revolucio, socialismo.

DEMANDO. Ĉu estas aranĝataj tiel nomataj «ruĝaj baptoj» — oktobrigoj, dum kiuj la infano estas bindata per ruĝa standardo kaj oni al ĝi pendigas insignon de l'komjunulo? Ĉu estas aranĝataj «ruĝaj entombigoj», akompanataj de «ruĝaj apostoloj» en speciala vesto? Ĉu estas plenumata dum tiaj entombigoj speciala ceremoniordo? (Rido).

RESPONDO. Mi volus, ke makaradoj vizitu la krematorion, kvankam ĝi estas ne tre gaja institucio, sed ili povus tiuokaze vidi, kiel estas aranĝata entombigo kaj ĉu estas utiligata de ni iu ritaro.

Vere, rilate al homoj, kiuj ludis eminentan politikan rolon, ni aranĝas honoran gardistaron apud al ĉerko por mencii politikan signifon de l'kamarado.

Ni metas ilian kadavron en la salono, kien venas kamaradoj por lastfoje adiaŭi kaj ili postenas ĉu atrmitaj ĉu senarmilaj apud la ĉerko de l'kamarado antaŭ lia entombigo. Ĝi estas la lasta h o n o r o, kiun oni elmontras al jam mortinta kamarado por mencii lian p o l i t i k a n rolon. Sed estas memkompreneble, ke neniuj «ruĝaj apostoloj» kaj «religivestaĵoj» estas. Ni opinias, ke la nigra katafalko, kiu celas simboli morton per malgaja tono, penas instigi ĉe homoj malesperajn «postmortajn» pensojn, ne konformas al niaj entombigprocesioj, se ni ankaŭ en momento de homa morto celas mencii r e v o l u c i a n f l a n k o n d e l'v i v o d e m o r t i n t o k a j t u t e n e i n t e n c a s p r i p l o r i ĝ i n. Por priplori estas bezonataj funebraĵoj — nigro, blanko ktp., sed ni pri tio ne zorgas. La ruĝa katafalko kaj ruĝa standardo akompanas kamaradon al tombo, ĉar li batalis sub ĉi tiu standardo dum vivo.

Nun pri la «oktobrigoj». Tiajn oktobrigojn ni ne aranĝas, oni ne pendigas al kolo de naskito komjunulan insingnon, se ankoraŭ ne estas konate, kiu li estos, ĉu estos li junkomunisto. Tion ni certe ne faras. Sed iuloke, precipe en provinco, estas aranĝataj ruĝaj oktobrigoj, kiam oni alpotras naskiton al iu solena kunveno, kiam la patro deklaras, ke li volas nomi sian infanon per nomo de certa fabriko aŭ de certa gvidanto, ke la fabriko prizorgu la naskiton, se la patro mortos ktp., kelkiuj similaj sentimentalaĵoj estas iuloke alplektataj al la afero. Sed ni neniam tion predikis kaj de nia flanko neniam subtenis ĉi tiun ritaron.

DEMANDO. Kia estas sinteno de l'ateistoj al la religia muziko, ekz., al la verkoj de Bach?

RESPONDO. Mi volas utiligi ĉi demandon por respondi, kia estas entutenia rilato al la religia arto.

Nun en la Okcidenta Eŭropo rusaj blankgvardianoj instigas grandegan bruon pro tio, ke ni detruas la katedralon de Savinto en Moskvo. Ni, efektive, detruis ne unu templon kaj kelkaj el ili estas tre valoraj por la koro de l'mondburĝaro kaj rusaj blankgvardianoj. Sed se vi bone vidis la templon de l'savinto, vi devas konstati, ke pli sengustan monumenton de l'arto apenaŭ oni povas trovi ie ajn en Eŭropo kaj en tuta mondo. Sed temas tute ne pri tio. Ĉio, kio estis tie vere valora de arta vidpunkto — pentraĵoj, skulptaĵoj, — ĉio ĉi estas konservita de ni en muzeoj. Vi povas vidi ĉe ni specialan muzeon de ikonpentrarto, en kiu estas kolektitaj verkoj de religiaj majstroj. Mi jam diris al vi, ke ni demonstras en teatroj la operon «Loengrin», kiu estas plejparte religia muziko. Krome ni demonstras tutan vicon de aliaj teatraĵoj,



en kiuj estas tre multaj religiaj momentoj. Ni tiel sintenas al la religia arto: ni ŝatas tie certan m a j s t r e c o n, ni ŝatas tiujn verkojn, k i e l h i s t o r i a j n m o n u m e n t o j n, k i e l c e r t a j n a r t o v e r k o j n, k a r a k t e r i z a n t a j n i d e o l o g i o n d e t i u a ŭ a l i a k l a s a s o c i o. Ke ni estas barbaroj, detruantoj de artomonumentoj, tio estas, certe, burĝaj fabeloj. Ĉion efektive valoran kiel artomonumenton, ĉu ĝi apartenas al muziko, ĉu al la pentrarto, ĉu al la skulptarto, ĉu al la arkitekturo, literaturo, — ĉion ĉi ni konservas tre zorgeme. Ni elspezas por tio monon, kaj se oni povas tiurilate riproĉi, tio povas koncerni nur tro grandan gardemon, kun kiu ni konsideras demandon pri detruo de tiu aŭ alia monumento de l'antikvo. Vi povas vidi sur Ruĝa Placo, ĉe stratangulo la malgrandan preĝejon, vere, sen kruco, kun kolonoj. Ĝi malbonigas tutan belaspekton de Ruĝa Placo, sed ĉar ĝi havas iun historian valoron, do ĝi estus dume konservata. Aŭ, ekz., la templo Bazilio Beata, ĝi nun, certe, tute ne harmonias kun la tuta placo, kiu estas plena de r e v o l u c i a j t r a d i c i o j. Sed ĝi estas monumento de l'arto de iu el italaj majstroj, kiu laŭ legendo estis ekzekutita de l'caro Johano la Severa. Al li eştis elpikitaj okuloj post la konstruo de l'templo, por ke li ne povu konstrui poste al iu ajn samspecan templon. Kaj ni tiajn monumentojn de l'arto konservas. Estus malkorekte, se ni, ekz., malpermesus muzikon de Bach nur pro tio, ke ĝi estas religia muziko. Mi opinias, ke en nia proletaro ĝi ne elvokas religiajn sentojn, ĝi elvokas en ĝi tute aliajn sentojn kaj humorojn. Kaj tio, kion la artisto verkis siatempe laŭ mendo eĉ, eble, de iu religia organizaĵo (mi ne scias historion de Bach'aj verkoj, ĉiuokaze tre multaj artverkoj estis kreataj laŭ socia mendo de feŭduloj, ekleziuloj ktp.) nun povas esti demonstrita antaŭ alia aŭskultantaro, kiu s i a s p e c e perceptos ĉi tiun verkon.

Tio ne povas malhelpi nin konservi ilin, kiel monumentojn de tiu aŭ alia epoko kaj arto, por ke ni ĉi tiujn monumentojn demonstru en muzeoj de skulptarto kaj pentrarto al nuntempa proletaro. Tio ne ekskluzivas tion, ke ni lernas de tiuj majstroj a r t m e t o d o n k a j k o m p o n m a n i e r o n. Ni kune kun iniciantoj de l'komunismo opinias, ke la scienca socialismo estas l a p l e j s u p e r a s c i e n c o, s i n t e z o de grandega ciklo de kulturoj, de ĉio valora, kio restis de ĉi kulturoj kaj kio estas a l i l a b o r a t a nun por bezonoj de l'socialisma socio. Ja por bezonoj de ĉi tiu socialisma socio ni povas preni el la malnova mondo kelkion necesan por ĉi nova mondo. La malnova mondo ellaboris certajn l a b o r- k a j t e k n i k m e t o d o j n. Ni ja ne diras, ke en dua tago post la revolucio oni devas forĵeti ĉion, kio estas kreita de feŭdalisma kaj burĝa kulturoj kaj ne utiligi tion. Kontraŭe, ni prenas ĉion utilan por ni el tiu kulturo, relaboras sinteze kaj donas al proletaro sub tiu formo, sub kiu necesas, ke ĝi (proletaro) influu laŭ direkto, bezonata por la socialisma kreado.

Samtempe ni kreas novan arton, kiu laŭ enhavo kaj formo estas nova, socialisma, proleta arto.

DEMANDO. Kiom da mono liveras la soveta registaro kaj UMA por la antireligia propagando en ekstersovetio kaj kion mone ricevas de USSR sekcioj de IPL?

RESPONDO. Mi devas kategorie deklari, ke l a s o v e t a r e g i s t a r o l i v e r a s n e n i u n m o n o n p o r a n t i r e l i g i a p r o p a g a n d o

en eksterlando, nek unu kopekon. UMA estas membro de l'internacia unuiĝo — IPL, ĝia devo estas pagi membrokotizaĵojn. Bedaŭrinde, ni eĉ ne plenumas dece niajn devojn tiurilate, ne plenpagas kotizaĵojn pro valutaj mankoj. Kiel vi scias, eĉ sinjoroj Sievers'oj provis tion utiligi por meti demandon preskaŭ pri nia eksigo el la Internacio. Ili postulis, ke ni pagu tutan monon. Se la afero estus tielmaniere, ke ni liveras specialan monon por antireligia propagando en eksterlando, do por kio oni tiel ofte rememorigis al ni pri tio, ke ni ne pagas eĉ membrokotizaĵojn? Jen kiel statas la afero. Tiom pli neniuj apartaj sekcioj de IPL povas ricevi de ni iun ajn materian helpon.

---

## DEKLARO DE LA IV INTERNACIA DELEGACIO DE PROLETLIBERPENSULOJ PRI ILIAJ IMPRESOJ PRI SOVET-UNIO

Akuta falo de la kapitalisma ekonomio tiomgrade akrigas klasbatalon en kapitalistaj landoj, ke ĝi neeviteble postulas solvon. Destinita por pereo la kapitalista klaso penas direkti ĉi tiun solvon por sia utilo, celante likvidi revolucian influon de socialisma konstruado en Sovet-Unio, utiligante por tio fimensogon kaj kalumniadon.

En ekonomia kaj politika regionoj ĝi tiurilate sukcesas ĉiam pli malmulte. Tiuokaze estas tro okulvideblaj sukcesoj kaj kresko de la socialisma sistemo kaj de la gvidanto proletara, Komunista Internacio kompare kun bankrotiĝinta kapitalisma sistemo kaj ĝia faŝista kaj social-demokrata partioj.

Tamen en kulturpolitika regiono la kapitalistoj trovas iun apogpunkton en malprogresemo de kelkaj laboristoj, kamparanoj kaj ceteraj loĝantartavoloj. Tial laŭ iniciato de Internacio proletliberpensula la delegacio, konsistanta el kristanaj, social-demokrataj, senpartiaj kaj komunistaj laboristoj el Germanio, Aŭstrio, Belgio, Holando, Hispanio, Sud-Ameriko, Ĉekoslovakio kaj Mongolio dum periodo de 14 Oktobro ĝis 18 novembro traveturis Sovet-Union de polia ŝtatlimo ĝis Uralo, de Tundro ĝis Transkaŭkazio por havigi komprenon per senpera observado pri ekonomia, kultura kaj politika stato de USSR. La delegacio vizitis kelkajn el la plej gravaj punktoj de la ekonomia konstruado. Ĉie ĝi havis eblon senmalhelpe interparoli kun gvidantoj kaj ankaŭ kun laboristoj kaj kamparanoj. La delegacio konstatas jenon:

Gigantaj ampleksoj de la socialisma konstruado, kolektivigado kaj industriigado de la agrikulturo ĉiuloke trafas en okulojn eĉ de plej facile atentanta observanto. Ĉi tiu konstruado estas ebla nur dank'al entuziasmo, kiu enkaptis laboristojn kaj kamparanojn de Sovet-Unio kaj kiu puŝas ilin antaŭen en konstruado de apartenanta al ili ekonomio, efektivigata per socialisma metodo de ŝturmbrigadoj kaj de socialisma konkurado. La laboristo kaj kamparano de Sovet-Unio scias, ke ili laboras por si mem kaj por ilia klaso kaj ke iliaj sukcesoj estas la plej gravaj vojmontriloj por liberigo de internacia laborista klaso. Per tio ja estas stipulita kolosa, unika en historio rapidritmo de la konstruado, kiu ne povas esti haltigita de iuj malfacilaĵoj, kiuj konsistas el detruo de multaj valoraĵoj, elvokita de la imperialista kaj ci-

vila militoj, el nesufiĉa teknika kvalifikeco de vastaj sovetiaj laboristamasoj kaj precipe el nesufiĉe disvolvita trafiko.

Esplorante ekonomian kaj teknikan evoluon de Sovet-Unio la delegacio havis eblon konstati, ke la membroj de Unio de Militantaj Ateistoj en USSR okupas pleantaŭajn poziciojn de la konstruado. En Rostov ĉe Dono la delegacio vidis grandej gan fabrikon, kiu deklaris sin la ateista. La delegacio ĉiuloke trafis ateistajn ŝturmbrigadojn, kiuj elmontris plej altajn indikilojn rilate al plenumo de la kvinjarplano kaj socialisma konkurado ĉu en urboj ĉu en kolektivigita kamparo. Ĉi tiu modela intenso de laboro de ateistaj laboristojn kaj kamparanoj en Sovet-Unio estas unu el kialoj de rapida kresko de ateista movado en USSR. La delegacio havis eblon konstati, ke la movado en vilaĝoj disvastiĝas kelkloke eĉ pli rapide ol en urboj. La ateistoj de Sovet-Unio partoprenas eminente vekadon de amasaj kreofortoj, kreon de novaj kontingentoj per teknika instruado, per preparo de kvalifikitaj laborantoj eĉ ĝis ruĝaj direktoroj el neinstruitaj laboristoj, kamparanoj. Kiom grandaj estas ĉi tiuj kreofortoj, montras multnombraj inventaĵoj, kiuj estas proponataj kaj efektivigataj de laboristoj por plibonigo de ilia industrio. Ĉi agado enkaptas eĉ infanojn.

Aktiva helpado de ateistoj al la konstruado estas samtempe plenumado parte de iliaj kulturaj taskoj. Sur bazo de la socialisma industrio kaj industriigita kolektiva agrikulturo en Sovet-Unio kreskas nova proleta kulturo. Ĝermoj de ĉi tiu kulturo elmontras sin en vivo de apartaj homoj, ĉu en vivo de la socio sub speco de plibonigo de iliaj vivkondiĉoj, sub speco de plialtigo de kulturaj bezonoj kaj ĝenerala kultura nivelo.

La delegacio havis eblon viziti komunistajn komunojn, kiuj estas ĝermoj de la estonta socio. Ĉi tiuj komunoj estas tutece ateistaj kaj distingiĝas per sia alta kultura nivelo. La delegacio konforme al sia karaktero de kultura kaj liberpensula delgacio pr cipe atentis ĉi tiujn probl mojn. Ĝi konstatis, ke virino ĉe tio ĝuas samajn rajtojn egale kun la viro kaj ke ĉio estas modele antaŭvidita ne nur por viroj kaj virinoj, sed ankaŭ precipe por infanoj.

La delegacio konatiĝis kun loĝeja problemo kaj higienproblemo. Ĝi vizitis klubojn, bibliotekojn, teatrojn, kinojn kaj ĉie konstatis ne nur ĝeneralan grandegan sukceson, sed ankaŭ aktivan helpadon de ateistoj. La delegacio bazante sin sur ĉi tiuj esplorobservoj povas plene konstati ke soveta vivo en sia dominanta parto estas ateisma.

Ĉi tiu fakto devas esti klarigata multparte per laŭplana laboro de ateistoj, en kiu ili ricevas energiecan subtenon flanke de sovetiaj amasorganizaĵoj en batalo kontraŭ restaĵoj de eklezio kaj religisektoj, precipe flanke de la komunista partio, junkomunistaro, sindikatoj kaj Ruĝa armeo.

Kontraŭ tiuj asertoj, kiujn disvastigas la burĝaro, ekleziorganizaĵoj kaj socialdemokrataj gvidantoj pri labormetodoj de sovetiaj ateistoj la delegacio estas devigata deklari, ke ĉi tiuj asertoj kune kaj dise estas fripona elpensaĵo. En Sovet-Unio ekzistas egala rilato al ĉiuj eklezioj, tio estas la ŝtato permesas al ili ekzisti, ne liverante al ili eĉ malgrandajn privilegiojn. La delegacio ne povis trovi eĉ solan fakton, kiam religiaj konvinkoj estas prematai per diktatoraj metodoj aŭ per teroro. Vere, multaj preĝejoj estas malfunkciigataj, malkonstruataj aŭ adaptataj por sociaj bezonoj. Sed tio ĉiam okazas nur kiam pro foresto de interesigitoj elmontriĝis sencela konservado de la konstruaĵo por antaŭa destino. La delegacio ne povis trovi eĉ unu okazon de kruela konduto kontraŭ pastroj kaj kredantoj, sed tamen ĝi trafis multnombrajn postsekvojn de kontraŭrevolucia agado de ĉi tiuj homoj, post kies dorsoj kaŝas sin blanku-



laj elementoj, estintaj burĝoj kaj kulakoj. La delegacio ankaŭ ne trovis neniigadon de personeco kaj ties transformon en senvolan ilon, kontraŭe, ĉie trafis vaste disvastigitan progresintan sinkonscion. Ĉi tiu fakto elmontras sin en senkompromita kaj decida nacia emancipiĝo de kulturo de subpremitaj de carismo popoloj sur teritorio de USSR, en plenigo de naciaj kulturoj per socialisma enhavo. Ĉiuloke en Sovet-Unio estas observebla nenie vidata aspiro de scio. Sovetia laboristo kaj kamparano scias, ke li estas libera homo. Li scias, ke al li apartenas estonto, ke li estas unu el ĉefaj faktoroj de konstruado de internacia socialismo kaj ke ĉi tio devigas lin kiel eble plej baldaŭ altigi sian kulturnivelon, sian kvalifikon. El ĉi tiu konscio elkreskas liaj kreafortoj, antaŭ kiu nun kliniĝas malnova, antaŭe estinta burĝa, intelegentularo, eniĝinta nun en socialisma konstruado.

La delegacio pristudis problemon pri kaŭzoj de grandegaj sukcesoj de soveta konstruado kaj konkludis jenon:

Laboruloj de Sovet-Unio povis atingi tian kreskon nur pro tio, ke ili en procedo de la proleta revolucio instalis la proletan diktaturon kaj eksproprigis la regantan klason.

Ili kreis por si reprezentantaron sub speco de sovetoj, elektataj laŭ proletademokrateca metodo, esprimantaj laborulvolon. Krom tio ili troviĝas sub unueca gvido de la komunista partio, partio de Lenin. Ili havas eblon efektivigi sian kulturan revolucion, ĉar de ili estas efektivigita fakte apartigo de la eklezio for de la ŝtato kaj de la lernejoj for de la eklezio, ĉar gvidado en kulturpolitika regiono troviĝas en manoj de sola kaj unueca organizaĵo — Unio de Militantaj Ateistoj. Do ĉi tie forestas bremsanta influo de socialdemokrataj gvidantoj, kaj revoluciaj fortoj povas ĉiuflanke kaj senmalhelpe disvolviĝi.

Kiom grandaj estas ĉi tiuj revoluciaj fortoj nun, post 14 jaroj de la komenco de l'revolucio, montris la parado de Ruĝa armeo kaj ankaŭ de armitaj kaj nearmitaj laboristoj la sepan de novebro sur Ruĝa placo, okazinta antaŭ okuloj de la delegitoj. Unu kaj duono milionoj da entuziasmaj laboristoj kaj laboristinoj, kiuj estas pretaj defendi ĝis lasta sangoguto rezultojn de sia laboro, plenigis tiun tagon la stratojn de Moskvo.

Se la proletaro en kapitalistaj landoj volas veni al samaj rezultoj, kiujn atingis rusaj laboristoj kaj kamparanoj, ĝi devas krei la samajn premisojn, kiuj estas konkeritaj de rusaj laboristoj kaj kamparanoj. Ĝi devas renversi per revolucia ŝturmo potencon de kapitalista klaso. Ĝi devas iri por kreo de la proleta diktaturo, por eksproprio de burĝaro kaj por ekposedo de ekonomia kaj politika potenco. Tamen ĉi tiu tasko estas plenumebla per neniigo de influo de socialdemokrataj gvidantoj al proletamasoj kaj per mobilizo de ĉi tiuj amasoj sub revolucia gvido, kiu estas prezentita sole en sekcioj de Komunista Internacio. Sur bazo de proleta diktaturo okazos kultura kresko kaj kreo de proleta kulturo en tiuj landoj, en kiuj nun dum burĝa regado estas observata ĝenerala kultura falo. Tamen necesa kondiĉo por tio estas kreo de unueca revolucia fronto kaj de forta unueca kultura proletorganizaĵo, revolucie gvidata.

Nur la revolucia gvidado garantias pluan premison por finvenko de laborista klaso, nome intiman internacian unuiĝon de ĉiuj proletoj inter si kaj precipe kun proletoj de Sovet-Unio.

La kvara internacia delegacio de proletliberpensuloj promesas, ke, forveturinte el Sovet-Unio, ĝi konservos kaj plivastigos jam ekiĝintajn internaciajn kunligojn, ke ĝi senreziste defendos Sovet-Union okaze de intervenciula atako kontraŭ Sovet-Unio kaj ke ĝi utiligos la impresojn, kolektitajn dum la vojaĝo, por aktiva helpo al

kreo en siaj landoj de revoluciproleta unueca fronto, al organizo de proleta revolucio, al kreo de proleta diktaturo kaj al konstruo de proleta kulturo.

Vivu proleta diktaturo, kiu sola garantias fondon de socialismo!

Vivu Komunista Internacio la gvidanto de proletaro survoje al la socialismo!

Vivu tutmonda Oktobro, pordego al socialisma mondo!

Vivu Unio de Militantaj Ateistoj de Sovetio!

Vivu internacia revolucia unueco de proletaj liberpensuloj!

---

## DEKLARACIO DE SOCIALDEMOKRATOJ, PARTOPRENANTOJ EN LA DELEGACIO DE IPL

Ni en Sovet-Unio plenumadis ne nur nian specialan taskon (konatiĝi kun kultura kaj ateista movadoj en USSR), sed ni bone trastudis ankaŭ politikan sistemon kaj ekonomian staton.

Ni agnoskas la politikan sistemon — diktaturon de proletaro kiel sole eblan formon de politika regado, kiu garantias al la proletaro tiun ekonomian liberon, sur kies bazo la proletaro povas konstrui sian propran kulturon.

Ni vidis, ke ateista movado en USSR estas ne izolita en politika kaj ekonomia vivo sed ateista movado, kiu sur bazo de marksismo-leninismo intime kunligas sian laboron kun ĝenerala ekonomipolitika agado.

Proleta ateisto devas esti ankaŭ politika laboranto. Sed politiko por atingi fincelon de la proletaro sur bazo de forigo de kapitalismo per demokrata vojo havao fakte neniun celon, kiel tion montras rezultoj de reformista politiko de II Internacio en kapitalistaj landoj.

Tial ni rifuzas ĉi tiun politikon de II Internacio kaj aliĝas al revolucia klasbatalo de III Internacio. Ni, membroj de G rmana liberpensula asocio kondukos tiudirekte nian politikan laboron inter laboristaro de Germanio. Ni elpaŝas por revolucia internacia unueco de proletaj ateistoj kaj kontraŭdiras tial unuiĝon de Germana liberpensula asocio kun Brusela burĝa internacio.

Vivu unueco de Germana laboristaro sub revolucia gvido de III Internacio!

B ü c k e l e y (Bukelaj) — membro de estraro de regionorganizaĵo de Germania proletliberpensula asocio.

S c h e f f e r (Ŝefer) — aktivulo de Germana liberpensula asocio.

F e l s e n — prezidanto de regionorganizaĵo de Silezia Germana liberpensula asocio.

---

# Enhavtabelo


La kvara delegitaro de ekstersovetiaj ateistoj. A. L u k a ĉ e v s k i j . . . 3

Parolado de k-do E m. J a r o s l a v s k i j . . . . . . . . . . . . . 7

Respondoj al la delegitaro. E m. J a r o s l a v s k i j . . . . . . . . 14

Deklaro de la IV delegacio . . . . . . . . . . . . . . . . . . 27

Deklaracio de Social-Demokratoj . . . . . . . . . . . . . . . . 30

## HAVIGU

## ATEISTAN LITERATURON EN ESPERANTO

| | |
|---|---|
| Unio de Militantaj Ateistoj en USSR kaj ĝia laboro | 0,25 gmk |
| Šejnman, M. Moralo religia kaj moralo proleta | 0,20 „ |
| Šejnman, M. Social-demokratio, religio kaj ateismo | 0,50 „ |
| Šervud. Vero pri persekutoj kontraŭ religio en USSR | 0,50 „ |
| Manifesto de IV kongreso de IPL | 0,10 „ |
| Kandidov, B. Eklezio kaj oktobra revolucio | 0,20 „ |
| Levada, O. Sendiuloj šturmas Dnepron | 0,20 „ |
| Buharin, N. Financa kapitalo en papa mantelo | 0,40 „ |

**MENDU:**

„EKRELO"

Löbauerstr. 35

Leipzig N 24, Germanio